

Ciudad Cuino

СЪЗДАТЕЛСТВО


N-ro 5
S-SEVILA FANZINO

VERKITA EN LA PLEJ BONGUSTA LANGVO. JES, LANGVO!



092
SEVILLA





FIA, MALĈASTA, SKANDALEMA
sezona fanzino en Esperanto.
Vintron-86
N-ro 5

ELDONAS:

SEJO

Pozo, 3 41003-SEVILLA
HISPANIO



INGE
KACMANN

SEKSA KAJ SENTIMENTA KONSULTEJO
Adresu viajn leterojn al
nia redakcio.

Kara Inge:

Mi estas dolĉa kordovanino,
kiu havas grandan seksan proble-
mon. Mi klarigos jene:

Dum la Granada Kongreso mi
Davis la ŝancon koiti (kvankam mi
ne plenumis) kun redaktoro de Ĉ-R,
sed videblis, ke lia kaco tro gra-
ndis kaj ĝi do ne povis eniri en
mian piĉotruon. Tial mi ne povis
esti fikata de li ĝis komplementa ĝu-
o. Reirinte al Kordovo mi vizitis
plurajn eminentajn seksologojn,
sed neniu el ili trafis doni solv-
on al mia problemo. Kion fari do?
Ĉu mi rezignu ĉeesti esperantajn
kongresojn?

Ref. 1-4/86-b/W

Eldonaj Kulpintoj:

PAKO LA TRIA, ED' BLOND, ALĈJO

Kaj nia nova
Kunkrimulo →
TONJO LA CENZURANTO,
kiu krome estas la
nova freŝbrila
sekretario de H.E.J.S.



Estimata kordovanino:

Via problemo fakte ne estas
problemo. Vi povos trankvile ĉees-
ti ĉiajn E-kongresojn, sed zorgu
pri la devenloko de la fikanto. Mi
klarigos kial: multaj virinoj, ki-
el vi, posedas mallarĝan piĉon, ki-
un la naturo donis al iŝi. Tion o-
ni science konas sub la nomo Kordo-
va sindromo. Tiaj ulinoj ne povas
esti fikotaj de viroj suferantaj
la vastecan sindromon, sed ja de
normalaj viroj. La vasteca sindro-
mo karakteriziĝas per longeco kaj
larĝeco de la kaco, kaj laŭ miaj
scioj, pluraj redaktoroj de "Ĉies-
revuino" kaj de "Kataluno" estas
trafitaj de tia malsano. Tial tiu
ulo ne povis plezurigi vin ĝis kom-
pleta ĝu". Do jen mia konsilo: Ko-
itu trankvile kaj laŭbontrove, sed
rezignu fari kun uloj trafitaj de
la sindromo. Bona maniero diveni,
estas antaŭdemandi de la fikanto
pri ties devenloko aŭ prekontroli-
kia estas ties kaco.

Restas je via dispono:

INGE KACMANN

LA KRANIOJ DE LA REGOJ

Andreo Sidworth




Antaŭ nelonge, estante en Dublin, mi decidis trafi la okazon por viziti la lokon, kie oni kronis antaŭ jarcentoj, la reĝojn de Irlando. Je suna printempa mateno mi trafis vagonaron kaj post trapaso de urbaj kvartaloj ni fine atingis la verdan kamaron, kie de tempo al tempo vidiĝis, en la distanco, fardomoj. Iuj el ili alproksimiĝis al ni laŭ la nerapida marŝado de la vagonaro kaj iam la lokomotivo haltis nin apud unu el tiuj domoj, kiuj evidentiĝis kiel stacio malgraŭ la manko de videbla vilaĝo. Mi enketis de paro kiu disdividis la kupeon kun mi pri tiuj izolitaj stacidomoj. La edzino respondis ke en la kamaro oni preferas kavi la stacidomojn apud la fervojaj reloj anstataŭ en la centro de la urbe-

toj. Post tiu respondo, plena de kamparana logiko, mi silentis, sed unue la virino kaj tuj post ŝi la viro, demandis kien mi vojaĝas, mi respondis ke mi estis irante ĝis An Uaimh, de kie mi intencis piediri al Tara. Ili pardonpetis pro neeble akompani min, ĉar ili lasos la vagonaron je la venonta stacio, kaj An Uaimh estis ankoraŭ du pluaj stacioj.

La lokomotivo, ankoraŭ vapora, pufiĝis forte por grimpi la nekruta deklivo antaŭ An Uaimh. La blanka fumo faris vatajn nubetojn kiuj baldaŭ malaperis en la bluo de la ĉielo, dum sur la kampoj pace paŝtis bovinoj. La vagonaro fine haltis en An Uaimh kaj mi descendis sur la peronon. Post iom da manĝo en unu el la urbaj drinkejoj mi komencis la piediradon al Tara, trapasante verdajn kampojn kaj ofte paŝtintajn bovinojn. Post unu horo mi atingis la ses cirklajn tunuloj, la nuraj restaĵoj de la

antikvaj reĝoj. Meze de la Reĝa Cirklo troviĝas la Lia Fálil (Stono de la Destino), kaj mi sidis sur ĝi kiel la reĝoj faris dum kronado. Sidante tie mi sentis misterajn vibrojn kaj ekvidis brilan bildon en kiu mi estis inter pluraj homoj kiuj kriis: "Vivu! Vivu!" kaj salutis per etendita brako al mi, kiu sidis sur la ŝtono. Ĉu la bildo reprezentis momenton de pasinta vivo mia? Ĉu mi vivis jam antaŭ jarcentoj kaj renaskiĝis? la vidaĵo malaperis kaj malgraŭ la varma suno mi nun sentis grandan malvarmon sur mia postaĵo. Mi agnoskis la malvarmon kiel indiko de Lia Fálil por ke mi starigu kaj ne pretendu esti reĝon kiu atendas kronadon. Do, mi staris kaj ekpiediris norden al la malgranda preĝejo apud la ŝoseo.

Ekster la pordo de la preĝejo estis maljuna sacerdoto portante eluzitan sutanon kun verdaj nuancoj sur la nigro, pro la aĝo. Li bonvenigis min al la preĝejo de Sankta Patriko kaj malfermis la pezan kverkan pordon. Li montris al mi la difektojn sur pordofosto kaŝitaj, laŭ li, far la soldaĵoj de Cromwell en 1649. Ni eniris la konstruaĵon por vidi relikvojn de la reĝoj de Tara. Li montris al mi ujon per kie li kolektis mondojn



4


por ripari la pordofoston kaj plendis ĉar post tiom da jaroj li ankoraŭ ne kolektis sufiĉe por la riparoj kaj ankaŭ ĉar Sankta Patriko, ŝajne, ne respondis al la preĝoj sed senkulpiĝis la Sankton dirante: "Povas esti ke Sankta Patriko estas iom surda ĉar li nun ne estas tiel juna kiel antaŭ jaroj!" Mi metis dudek-pencan moneron en la ujon kaj provis vidi iun relikvon inter la polvo kaj araneajoj kiuj abundis sur benkoj, muroj kaj fenestroj. Mi enketis de la maljunulo pri la relikvoj kaj kiel respondo invitis min al aĉeto de kandelo por meti antaŭ la statuo de la Sankto. Kontraŭ pago de plua dudek-penca monero li donis al mi etan malpuran kandelon kaj mi metis ĝin en kandelington sed ne povis bruligi ĝin ĉar ne estis brulanta kandelo en la preĝejo kaj mi ne portas alumetojn. La sacerdoto diris ke li bruligos ĝin poste

kiam li akiros alumetojn. Mi volis dubi tiun aserton sed la Sankto rigardis min severe, ĉar ĉiu scias ke estas granda peko dubi pri vortoj de sacerdoto, do mi ne plu kuraĝis pensi pri la plua penso ke ne bruligante la kandelon li povos vendi ĝin al venonta vizitanto! Mi sekvis lin en la sakristion kie kaj la polvo kaj la araneajoj ankaŭ abundis. "Jen" li diris indikante du kraniojn, unu grandan kaj unu malgrandan, sur senpolva breto, "La kranio de la lasta reĝo de Tara kristianigita de nia amata Sankta Patriko" kaj li krucosignis. Mi rigardis la nigrecan kranion kaj demandis pri la malgranda, same nigreca: "Kaj Patro, al kiu apartenas la malgranda?" Li respondis: "Tiu estas la kranio de la reĝo kiam li ankoraŭ estis knabeto" kaj denove krucosignis.

Andreo Sidworth.

(Anglio)

LA KOLBASO DE L'UDOVİK'



MOLLET-86

SEN PERMESO DE "FER" NEK DE "LA JAŬDO."

J A M I VOĈDONIS JESEN!

Ĉar mia lasthora decido ŝokis mian kolegaron (ĉefe tiun esperantan) kaj ĉar mi enuas pro tio, kion vi jam scias -la arme-servo-, estas mia volo klarigi p ublike mian pri-ĉi-referenduman sintenon, kiu ŝajne - laŭ la re-akcio de mia kunula rekrutaro ne respektindas.

Mi prezentu la aferon logike, dedukteble, preskaŭ science:

Miakonvinkiĝa flanko.

-Ĉu mi estas kontraŭ-NATO-a ?

- Ja.

-Ĉu mi malamas Calvo Sotelo-n pro tio, ke li enmetis Hispanion en NATO-n ?

- Ja.

-Ĉu NATO estas grava parto de la maŝino ekspluatanta trian mondon ?

- Ja.

-Ĉu ni elirus el NATO kaze de nea rezulto ?

- Ja ne !

-Ĉu kaze de Filipa frenezigo kun rezulto de hispana eliro el NATO , Hispanio daŭrus ene de tiu antaŭe citita ekspluatanta maŝino ?

- Ja.

-Kiu politike venkus pro nea rezulto ?

-Dekstrularo, (kaj tiu laŭte faŝisma , kaj tiu kaŝe faŝisma (AP) kaj tiu demokratia).

-Kiu politike perdus ?

-La registaro kaj la SP.

-Ĉu ekzistas progresema-aŭ malpliracia- alternativo ?

- Ja ne .

-Kion signifas voĉdoni nen ?

- "Iru merden, Filipino; eniru Monkloen, Frago !" .

Romantika aŭ sentimentala flanko.


-Mi estas filipisma.

-Frago ne regu !

Stulta flanko.

-Ankaŭ mia patro voĉdonis jesen.

Nu, ĉi ĉio miksitita en mia cerbo igis min voĉdoni jesen.



Krome, mi rakontu al vi, kion multaj ne spertis la nokton de la referendumo:

Je la deka kaj duono, kiam mi ekenlitiĝis, ulo informis min pri la unuaj konitaĵoj: venkas la jes-opinio kaj partoprenis 60% (mi certas pri tio, se Frago petus "jes", partoprenus malpli). Tuj post ol sciigi mi sentis spiritan plezuron, kian de antaŭ multe da tempo mi ne sentas. Sed mi sentis ankaŭ korpan ĝojon, kiu prezentigis per sovaĝa kaca erektiĝo.

Malgraŭ mia laceco ĝi daŭris ade stangeca kaj - mi tiel surprizitas kiel vi-ĉiu movo de mi plenumita ekscitas ĝin pli. Verdire mi ne scias, kion fari. Time kaj zorgege mi ekdemetis mian kalsonon, kaj kontraŭ ĉia logiko eĉ per la froteto de tiu malpurega kaj kontraŭsana littuko - adjektivoj kaj kondiĉoj pri kiuj mi tute konscias dum ĉiu

tiam sekundo - mia aĵo volupte vibregis. Mi tion ne povis elteni; forte manpremis ĝin kaj detiam ne mi, sed ĝi regadis mian volon.

Certe la skuado estis forta, besta; sed multe pli forta kaj besta estis mia interna ĝuskuo, tremego, kiu igis min krii kiam alvenis la momento "HAAA! PRENU FRAGOOO! ĈION POR VIII! -n. Kaj dume spermo varma, tre varma; likva, tre likva lavange baptis min kaj inundis mian liton.

-Kio okazas, kio okazas ĉi?

-Nenio... Mi ĵus elĵetis.

-Ĉu vi ne povas tion fari silente?


-Jes; tamen ĉi foje... tute malsamis.

-Nu, silentu bone!

Post ol lavi min kaj mian liton, pli laca kaj feliĉa mi reiris enliten. La malvarmega akvo ne forgesbligis tiun ĵus ĝuitan plezuron, ĉar antaŭ ol fali ensonĝen mi povis rimarki, ke sur mia vizaĝo, en ĝia surfaco, desegniĝas plej anĝeleteca smajlo.

Lantritma spirado kaj eĉ rozodoro... Ja mi voĉdonis jesen.

Pako la 3-a.






(P)

(P)



Gorbaĉevo finfine trovis la lokon, por ke Sajarov pasigu siajn vintro-feriojn en Siberio.



PEPOĈJO FINFINE REĜO!!! KAJ NIGRA!!! (en la Kavalkado de la tri MAGOJ en Seviljo). Espereble li donos kiel Mago pli da dolĉaĵoj ol kiel lendaĵaro.*



Jen ridanta Karol post aŭdi la demandon de sia filo: Paĉjo, kie Britio redonos Ĝibraltaron al Hispanujo? Ŝi alkomentis: H tiu aĉa simiŝto kie ni pasigis n mielan tempon

* Prezidanto de aŭtonoma Komunumo en Ĉ-R-slango (el la vaska

..... Kaj alvenis la "iksa tago". Jen ĉombo¹ surŝultren kaj plurhora senhaltata veturado venigas nin ĝis la celata urbo.

Sed nia plenespereco ekforviŝiĝis kiam demandinte iun, respondis ĉi lastan: Kio? bonveniga avenuo? Jes ja oni ne ricevintus nin per kisoj kaj flo-roj en la de ni naive supozita homamasa bonveniga avenuo.

Do ĉien ni turnis nian rigardon por renkonti ĵurnalistojn en foto-fulmado antaŭ enirejo (sub kvinpinta verda-stela egflago kompreneble).

Sed akra realiĝo igis nin plisaĝe ne plu okulserĉi kaj tial ni demandis rekte kaj senplie al promenanta tieano: S-ro, bonvolu, kie la kongresejo? ties respondon niaj oreloj rifuze prikredis (feliĉe ni ne demandis lin pri lia mono de E-o).

Ne nur personojn sed eĉ ne flagon en la kongresejo! Tial ni svejal-tis² kaj nesenpeno trafis la toaon³ ĉikongresan nome la izolitan prezidenton.

En la Kongreshalo (plibone dirite Kongresĉambreto) ni ekvidis bil-ton de ĝanpina⁴ valoro, nome: duonkilometra librokovrita tablaro! Ĝuste tio igis nin pensi, ke la libro-alportintoj tute ne meritas ilian urbonomon, do Mal-aganoj.

La "fierulo"⁵ de l'Kongreso frue aperis. Certe lin envidus eĉ la plej malvigla filatelisto ĉar leteroj kaj sekve poŝtmarkoj ja ne mankis. En nesufiĉaj ampleksaj tabeloj li pendigis leterojn ricevitaj de ĉie en nur kelkaj monatoj!!!

Krom E-o estis alia oficiala laborlingvo, aŭ almanan tion mi supo-zis ĉiudinte du samideanojn interbabilante ide (volu kompreni bone: ni ne celas ĉi ti, ke iliaj gepatroj samas aŭ io simila, nur simple: ili parolis en la ida lingvo).

La vera "idaro" de l'Kongres'estis tiuj fantomoj amase alvenintaj deĵe el Kordovo kaj amase malaperintaj plejofte, kiam iliaj nazoj enflaris taskon. Tial la kunvenoj estis apenaŭ duone homplenaj despli, ke nepre oni parolis E-on (da-ntial tio ke ĉeestadis alilandaj s-anoj, se ne: veee!).

Fine ni ĉiuj jam aniĝe dum la Komuna Tagmanĝo nepre intervidiĝis vi-ante la vizaĝojn unu al alia. Tamen jam kiam ni venis al la fino de la plej longa tagmanĝo iam okazinta mi devas konfesi mian emon al tia "krokodilema idaro" ĉar mi konstatis, ke la "nekrokodiloj" kelkfoje krokodilemas kiam ties "krokodilaj larmoj" ĉuonaperas je la adiaŭo.

Vortoj ne trovoblaĵ en PIV:

- 1 - Ĉombo: el svahila lingvo: la tuto de ĉiuj moveblaj havaĵoj de persono.
- 2 - Svejal-ti: el la ĉina lingvo: malrapide, hezitime iri pro timo aŭ singardemo.
- 3 - Toao: el maoria lingvo: plenaĝa, plenforta viro ĉiam preta por batalo.
- 4 - Ĝanpino: valoro, prezo ne eldirebla per mono, (el la ĉina lingvo).
- 5 - Fierulo: ulo voranta lernolibrojn kaj esperantaĵojn pro ties esperantemo (el sevila lingvaĵo andaluza, t.e. el sevila esperantio).

En la Kongresa
straro ĉe 3-a
azetara kon-
ferenco.



de Blas' Infante

Antaŭ kelkaj semajnoj la seviljan publikan opinion skuis -sed ne tro, se verdiri- atenco kontraŭ la buston de Blas' Infante, Patro de la Andaluza Patrujo, starigitan omaĝe al lia memoro en placo de la kvartalo Pio la Dekdua.

Kiu responsas? Ĉu faŝistoj? Ĉu simplaj huliganoj? Ne; la vero surprizigis nin mem, malgraŭ nia alkutimiĝo -se ne diri emoj al la skandalaĵoj; kaj ni ne kredus ĝin se ne estus pro tio ke la informo fontas el nia propra puto: el unu el niaj redaktoroj, el Pako la tria. Tamen ne en tio konsistas la surprizaĵo, sed kio vere skuis nin -kaj multe pli ol la seviljanojn la atenco- estas ke la informo elpaka venis je la formo de konfeso, ĉar li, Pako la tria estis tiu kiu fortranĉis la kapon de Blas' Infante.

Sen plia komento jen sekvas la raporto pri liaĉepopeo, kvarverse verkita de li mem, originale en esperanto:

ĈR

Mi promenis tre senpense
tra kvartal'Pi' la dekdua.
Nenion mi tenis enmense,
tra la cerb' nenio fluas.

Min direktis la fortuno
al placeto ja konita
prezidanta ĝin la busto
de la "patr' andaluzia".

Al mi venis la demando
kion faras mi en mondo?
Nur lernadi esperanton
kaj praktiki ĝin en rondoj.

Mi afliktis konsidere
ke nenia spuro restos
post viv' mia kaj ke vere
ĝin neniu poste festos.

Mi plenumu kiun agon?
Mi laboru kian verkon,
kiu donu al mi famon
dum la viv' kaj en la ĉerko?

Tre necesis tuj decido;
preskaŭ dudekkvarjaraĝa
estas mi, elpreta viro,
kaj tutrajta kaj tutsaĝa.

Kial ne en ĉi momento?
Kial ne en jena loko?
Kaj post ĉi demanda sento
min rigardis tiu roko.

Al vi ĵuras mi ke tio
estas vero, dira ĝusto;
temas ne pri iluzio:
min rigardis ĝi: la busto!

Glaciiĝis en mi sango
ĉar ĝi fikse min trafadis.
Miaj membroj iĝis stangoj.
Rigard' ĝia vere mavis!

Tiam fride mi ekŝvitis
pro la peno, la klopodo
igi la rigardon gliti
for l' okulojn de l' fantomo.

Mi sukcesis, vanka lukto
kontraŭ ĉi hipnotan kapton.
Mankis do nur preni frukton;
el koŝmaro tiri fakton.

Jen alvenis la respondo,
restis jam nenia dubo,
en ĉi punkto de la mondo
forĝu mi mian futuron.

Mi min venĝu de ĉi ulo
spite lian altan rangon.
Naciismo tra la pugon!
Pugen ankaŭ ĝia "patro"!

Ĉar ĉu eble mi ne SAT-as?
Ĉu ne HEJS-as, ĉu ne ĈR-as?
Ĉu Filipon mi ne estas
kaj Alfonson ne estas?

Konvinkite ke kongruas
kun la nia cerbamaso,
per pieda bat' kungfua
ni regalis ŝtonan Blason.

Trafa bat' kiu surbuŝis,
tuŝis nazon kaj orelon;
ni nesperte planken kuŝis
brufalinte sur la teron.

Sed ne estis ni la sola,
ĉar surplankis ruliĝante
apud ni la tre malmola
ŝtona kap' de Blas' Infante.

Pensis mi: de nun mi estos
fankonata kaj eĉ riĉa,
en ni la feliĉ' ennestos
kaj abundos trezor' piĉa.

Vide tiun bildon ĝojan
ni revenis en prezencon,
kiam polichundoj bojas
alvokitaj pro l' atenco.

Nu mi saltis ree staren
kaj eskape ekis kuro.
Poste sekvis hundoj flare.
Savu min nur miaj kruroj.

Mi feliĉis malgraŭ hasto,
ĝojis malgraŭ la danĝero;
mi forĵetis la balaston
de la tim' kaj malespero.

Min ne eblis jam atingi,
mi trakuris stratojn, getojn
ĝis heroe ni min ingis
en kvartalon La Birdetoj.

La Birdetoj! La Patrujo
de ŝtelistoj, huliganoj.
Gloron portos al Vi l' tujo
pro l' kuraĝ' de nizstratano.

Pako la tria

Ĉiamaj Kanzonoj

SEVILIA KANZONO

Ve, tiuj viroj el Sevilio,
la plej varmegaj por la amoro.
Grandega kaco, grandaj ĉurovoj,
malgranda cerbo, malgranda koro.

Ie voluptece ili sopiras
virinojn ronĝas fikatdezir'.
Antante ili ĵetas mil kisojn
n ĉiu noto de la muzik'.

Ho ve! Ho ve!
Seviliano, tro subite.
Ho ve! Ho ve!
Vi kiel fulme agas lite.
Ho ve! Ho ve!
Daŭrigu pli da seks'!

Ol niaj maskloj el Sevilio
ne estas maskloj pli ekscitantaj,
sed ili ŝatas dirtajn fikadojn
multege pli ol fikadoj lantaj.

Ja kvazaŭ ŝipo en mara ŝtormo
ili moviĝis dum fik' barakte,
sed la femaloj ne plendas dure
ĉar ĉiuj ĝuas orgasmon fakte.

Ho ve! Ho ve!
Seviliano, tro subite.
Ho ve! Ho ve!
Vi kiel fulme agas lite.
Ho ve! Ho ve!
Daŭrigu pli da seks'!

Pako la tria.

Vintro
Pago

Ĉ-R.



Por iel forgesigi vin pri la frostado de ĉi vintro, jen foto, kiun sendis al ni niaj anglaj amikaj reporteraj. Ne nur Pepoĉjo aperas skandale !!!

Tia eliris Andreo post ekzameno lernantojn de la elementa nivelo en la Granada Kongreso. Iu el ili deklaris al Ĉ-R:

NI ESTAS SENHONTE FIKITAJ DE LI. KIA VOSTO!!!

→ Jen senprecedenca sociologia studo pri tipoj kaj kondutoj en la sevila esperantistaro, aplikebla ankaŭ al aliurbaj esperantistaroj. Legu kaj povu ingigi en unun el ili. Memoru, ke al "fierulo" oni donis novan sencon ne sidantan sur PIV. Vidu klarigon pri tio sur paĝo 11. Guu la tabelon!

Ĉ-R - RESERCOT

Teamo nul.

KONDUTOJ ↑	TIPOJ ↓	Ĉeestas al Kvin-venoj...	Lingva Intereso	Intereso pri la Interna Ideo...	Movada Intereso	Portas verdan stelon...	Parolas mise pri la anglaj...	Parolas Esperanton	Legas en Esperanto...
OLDULO (50-80aĝa)	kun edzino	memorigi ke en E-o ekzistas nur 16 reguloj	varme defendas la Internan Ideon en Hispana	aliĝas al ĉiaj E-organizaĵoj. Iĝas estro.	tre videblar	"Paras, 40 jaroj ke mi lernis la anglan."	"Fartu bone!" "Saluton!"	E.P.Ĉ. Boletín Gazeto Ĉi-ĉi-	
FIERULO (ĉiuaĝaj)	sola	Mangaĉi pri amafikas PIV.	Mangaĉi ĉion pri Interna Ideo	Aliĝas al ĉio (eĉ al HEF)	Grandan	Ofte	Escepto kaze, jes	ĈION!!!	
KOMPETENTULO (17-40aĝa)	kun kolegoj aŭ sola	Tre lerte regas gramatikajn kajojn.	Fajfas	Aliĝas, malaliĝas, laboras, ĉesas...	Malofte	Ne	Tre ĝuste	Monato, Kataluna Ĉi-ĉi-ino...	
BARBULO (25-35aĝa)	Sola aŭ eble kun edzino aŭ filo.	De "Lingvaj restpontoj" ĝis PAG	Granda. Ankaŭ pri pacismo, ekologio	Aliĝas al pluraj E-organizaĵoj	Ne tro ofte	JA	sufiĉe bone	Preskaŭ ĉion	
FAJFANTO (Kutime junulo)	Malofte. Se jes, sola	Ne tro multa	Fajfas	Fajfas (eble aliĝas al SEJO)	Fajfas	Fajfas	Fajfas	Eble Ĉ-R, se ne, fajfas.	
JUNULINO (17-25aĝa)	sola aŭ kun kamaradinoj	Ne tro multa	Tre granda	Aliĝas al lokaj Asocioj	JES	JES	Provas sed ne atingas	Provas sed ne atingas	

LE IDEOJ DE MARMEN



HEJ,
MARMEN!



KIOM DA TEMPO SEN VIDI
CIN*!! SE VI SCIUS, KIOM MI
ŜATAS FREŜULINOJN...



MI SOPIRAS PORKULINDJN,
KIUJ EMAS FIRILATOJN!!
NU, ĈU MI ĈURU CIN!!



ORGASME
VL'!!!



ĈI!??



ANKAŬ MI ŜATAS FIRI-
LATULOJN II MALINGU,
OĈJO, MI LASOS VIN
PLI SEKA OL MORUO! HE,
HE, HE!



ĈI, KION PENSIS PRI MI,
PUTIN'? FITUŜANTE MIN
ANTAŬ ĈIUJ!!!???



ĜISTIE MI POVUS ELTE-
NI II KIAJN FIULINAĈOJN
ONI TROVAS NUN!! ERU
FEKEN!

* VIDU PAĜON 0

MARIEL SANDRES MARTIN

La centjariĝo de esperanto markas la komencon de nova etapo en Esperantujo; nur la abundaj jubileaj kongresoj okazontaj ĉi-jarigas, sed ankaŭ -kaj pli- tio ke ni jam havis historion kiu esploras sciencojn. Precipe tio estas mia intenco verkante ĉiun.

Ĉiuj konsentas ke la hispana E-movado estas malgranda, fakte ĉiam estis tiu, tamen la nuna perspektivo donas komplikajn vidon kiu, kaj kun la helpo de pacienca studo, konstatas plurajn klare difinitajn fazojn en kiuj ni povas vidi la historion evoluanta de la movado en Hispanio, kaj per kiuj ni povas taŭvide difini la estontajn fazojn.

Homo Zamenhofus.- La pioniro. Li prenis kaj la lingvon kaj la ideon zamenhofajn, konsekvence ĉiujn lajn antaŭjuĝojn. Lia agado estis silenta, sed sukcesa, ĉar jen estas ni, ĉiuj idoj.

Homo Antolinus.- Ĉi tiu perigis esperanton kaj an movadon de certaj antaŭjuĝoj, sed ilin anstataŭ-

Antaŭa al
la ora HEF-
epoko


taŭgis per aliaj; neniu perfektas. Per li la markismo, ĝiaj idoj kaj oidoj eniris en la movado. Ankoraa estas kiuj ne pardonas tion al li.
3) Homo Zaragozus.- De la naskiĝo de esperanto estis samideanoj en Hispanio, samkiel en aliaj landoj, kiuj multe klopodis pri ĝia instruado; sed estis ĉi tria speco la sola kiu dum sia tuta ekzisto dediĉiĝis nur al tio. Tiaj uloj kulpas pri la plej aĉaj lernokaj instrumentoj, kio pruvas la grande-

Ora HEF-epoko

gan fiaskon de ĉi feliĉe estinta homo.
4) Homo Aragajus.- Ĉi homo, kiu ankoraŭ kunekzistis nin, reprezentas gravan antaŭeniron kompare al la du antaŭaj. Li fakte li berigis la E-movadon de multaj balastoj ĝin enkatenigantaj, sed ankaŭ de skrupuloj. Kun li ŝanĝiĝis la morala valorskalo: ĝian plej altan rangon jam okupas ne Nia Fondinto, sed la peseto. Por ĝi li faras ĉion, sed per ĝi oni ne scias kion li faras; mi ri-

petus: neniu perfektas. La mafiaj metodoj alvenis en E-movadon danko al ĉi homo.
La nuna vidas la apotegeon de la Homo Aragajus; tamen jam aperas alispekaj esperantistoj per kiuj eblas diveni kia estos la futuro. Jen serioza hipotezo:
5) La tujaj esperantistoj strebos malaperigi la Homon Aragajus kaj demafii la movadon. Ili sukcesos pri sia unua tasko; tamen kiam ili estos kaj gustos la dolĉecon de la ara-

gaja metodo, ili dronos en la saman putran koton.
6) Denove venos la utopiistoj, religiemuloj, sektemuloj kaj ĉiaj frenezuloj. Ĉar ili tiom stultas, la sama mafio estos la movadon, kiu multe riĉiĝos.
7) La finontoj de la movado. Ili rimarkos ke estas sensencaĵo provi purigi la fian estraron, ĉar estas pli facile kaj oportune nepagi al ĝi, lasi ĝin. Ili lernos la anglan kaj senbrue, senskandale, silente ili kabeos.



1
HOMO
ZAMENHOFUS

2
HOMO
ANTOLINUS

3
HOMO
ZARAGOZUS

4
HOMO
ARAGAJUS

*5

*6

*7

Sur la foto : Pedro Pacheco, urbestro de Jerezo.



LA SEVILIA JUGÛSTARO PRAVIGIS :

“ LA JUSTICO ESTAS
MOKŜERCADO ”